## 2. Jesuo estas la kreinto

La Biblio komenciĝas per la frazo: »*En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron*« (1 Moseo 1, 1). Anstataŭ la vorto Dio tie estas skribite per la hebrea vorto »*Elohim*«, kiu gramatike estas plurala formo. Ke Dio, la Patro, ne estas la sola, kiu kreis, eliras jam el la raporto pri la kreado: »*Ni kreu homon laŭ Nia bildo*« (1 Moseo 1, 26). En la Nova Testamento la demando Kiu? estas pli precize traktita. Tiel laŭ 1 Korintanoj 8, 6 Jesuo Kristo estas klare kunaginta ĉe la kreado: »*... tamen por ni estas unu Dio, la Patro, el kiu estas ĉio, kaj ni por Li; kaj unu Sinjoro, Jesuo Kristo, per kiu estas ĉio, kaj ni per li*« (1 Korintanoj 8, 6).

Kaj en la epistolo al Hebreoj 1, 2 ni legas: »*... kiun* (Jesuon) *Li nomis heredanto de ĉio, per kiu ankaŭ Li faris la mondaĝojn.*« La komenco de la evangelio laŭ Johano samtiel dokumentas, ke ĉio sian originon havas en Jesuo: »*Ĉio estiĝis per li* (per la Vorto, ĉi tie alia nomo por Kristo) *kaj aparte de li estiĝis nenio*« (Johano 1, 3). Pri la krea faro de Jesuo ni povas legi en la epistolo al Kolosanoj 1, 16-17: »*... ĉar en li kreiĝis ĉio en la ĉielo kaj sur la tero, ĉio videbla kaj nevidebla, ĉu tronoj, ĉu regecoj, ĉu estrecoj, ĉu aŭtoritatoj; ĉio kreiĝis per li kaj por li; kaj li estas antaŭ ĉio, kaj en li ĉio ekzistas.*« Ene de nia videbla, materia mondo, troviĝas nenio, krom kreita per Jesuo. La senmezura kosmo kun milionoj da galaksioj ĉi tie same inkluziviĝas, kiel aliflanke la plej fajnaj detaloj en la vivo de unuopa ĉelo, aŭ la struktura kompono de atomo.

Jesuo tamen ne estas nur kreinto, li estas ankaŭ la retenanto de tiu ĉi mondo. Ĉio ŝuldas sian ekziston al li. La mondo, post kiam kreita, ne estis postlasita al si mem, sed ĝi estas portata per la forto de lia vorto, kaj ĝi tiun vorton ankaŭ ricevas. Tiel ni ne bezonas timi antaŭ tia aŭ tia kosma katastrofo okaze de la interstela kolizio aŭ okaze de elbruliĝo de la suno kaj ĝia malvarmiĝo. Jesuo retenas la mondon ĝis sia dua alveno.



Kiel kreinto Jesuo estas tiel ankaŭ la Sinjoro super ĉiuj aferoj. Li ne elpensis nur la leĝojn de la naturo, sed li ilin ankaŭ instalis. Tial li ilin ankaŭ povas laŭbezone elŝalti. Tian procedon oni nomas miraklo:

**Trankviligo de la ŝtormo** (Marko 4, 35-41): Dum Jesuo troviĝis kun siaj disĉiploj en la boato sur la lago de Genezaret, aperis tre forta ŝtormo. Jesuo dormis sur la ferdeko, sed la disĉiploj jam vidis sin ĉe la rando de la morto. Kiam ili lin vekis, sufiĉis lia minaco kaj la ventego kaj la ondegoj eksilentis. Li havis povon super la naturleĝoj.

**Lazaro vekita el la morto ree en la vivon** (Johano 11, 1-45): Laŭ la vidpunkto de Maria kaj Marta Jesuo alvenis en Betanion tro malfrue por povi la malsanan Lazaron ankoraŭ sanigi. Lazaro jam mortis. Sed por Jesuo nenio pli simpla. Li eldiris ambaŭ ordonojn: »*Forprenu la ŝtonon!*« kaj »*Lazaro, elvenu!*« Tio estis sufiĉe por elvoki la jam mortintan Lazaron ree en la vivon.

## 3. Jesuo Kristo estas unika

Elinter ĉiuj, kiuj iam ajn vizitis tiun ĉi mondon, la Filo de Dio Jesuo Kristo estas la sola kaj la unika, nekopiebla.

Li estas la nura Dio, kiu nin en tiu ĉi mondo vizitis. Ĉe Johano 5, 19 Jesuo diras: »*Vere, vere, mi diras al vi: La Filo ne povas per si mem fari ion, krom tio, kion li vidas la Patron faranta; ĉar kion ajn Li faras, tion la Filo tiel same ankaŭ faras.*« Tiu eldiro de Jesuo, povi fari ĉion, kion la Patro faras, sendube montras, ke Jesuo estas Dio. Kiu, nome, povus fari **ĉion**, kion Dio faras? Nur tiu, **kiu mem Dio estas**! Per la kredo en tiun Jesuon mi renkontis Dion!

**Li** estas **la sola**, kies biografio estis anoncita jam jarcentojn antaŭe. Nur pri tiu la sola la loko de lia naskiĝo, lia karaktero kaj agado, la cirkonstancoj kaj detaloj pri lia morto, estis precize antaŭdiritaj kaj skribitaj.



**Li** estas **la sola**, kiu restis senpeka (1 Johano 3, 5).

**Li** estas **la sola**, kiu per sia morto la morton supervenkis, ke tiel nun validas: »*La morto forglutiĝis en venko. Ho morto, kie estas via venko? Ho morto, kie estas via pikilo?*« (1 Korintanoj 15, 54b-55).

**Li** estas **la sola**, kiu el la motivo de la amo al ni sin disponigis morti: »*Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidas al li, ne pereu, sed havu eternan vivon*« (Johano 3, 16).

**Li** estas **la sola reganto**, kies regno estas senperea: »*... kies regno estas regno eterna, kaj ĉiuj potenculoj servados kaj obeados al Li*« (Daniel 7, 27b).

**Li** estas **la sola**, kiu al ni revelaciis, kiamaniere finiĝos la historio de la mondo. Lia dua alveno ĝin kompletigos. Kaj post tio estos konfirmite, ke mi en mia vivo prenis ĝustan decidon.

**Li** estas **la sola**, kiu montras al ni la vojon en la ĉielon. Ĉe Johano 14, 6 li diras per sia senduba maniero: »*Mi estas la* (nura) *vojo, kaj la* (nura) *vero kaj* (eterna) *vivo; neniu venas al la Patro* (en la ĉielon) *krom per mi.*« Kun tia senduba klareco parolas ankaŭ multnombraj aliaj versikloj, el kiuj ni ĉi tie elektos nur du:

»*Kiu fidas al la Filo* (de Dio), *tiu havas eternan vivon; sed kiu ne obeas al la Filo* (de Dio), *tiu ne vidos vivon, sed la kolero de Dio sur li restas*« (Johano 3, 36).

»*Kaj en neniu alia estas savo; ĉar ne estas sub la ĉielo alia nomo, donita inter homoj, per kiu ni devas esti savitaj*« (Agoj de apostoloj 4, 12).

## Kiu plej forte la mondon ŝanĝis?

Al nia komence starigita demando nun troviĝas respondo. Per siaj vortoj: »*Iru do kaj disĉipligu ĉiujn naciojn*« (Mateo 28, 19) Jesuo esprimas tion, ke lia savmesaĝo estas adresita al ĉiuj homoj en la tuta mondo. Ĉiu estas invitita: »*Kaj tiun, kiu venas al mi* (Jesuo), *mi ja ne elĵetos*« (Johano 6, 37). Nun temas nur plu pri tio, konfidi al tiu Sinjoro nian vivon kaj konsekvence iri lian vojon kun li.

Neniu alia krom Jesuo la sola faris por la homoj ion pli grandan – tiel li min mem kaj ankaŭ nian mondon plej forte ŝanĝis.



Dir. prof. a.D.
dr. ing. Werner Gitt
wernergitt.de

Titolo de la origina eldono: Wer hat die Welt am meisten verändert?
Hejmpaĝo de la aŭtoro: wernergitt.com
Tradukis: Vinko Ošlak

Photo credits: front page: © Tryfonov - stock.adobe.com; page 2: © Tryfonov - stock.adobe.com; page 3: © Rymden - stock.adobe.com; page 5: © metamorworks - stock.adobe.com; page 7: © Roman_Mikhailov - istockphoto.com; page 9: © skynesher - istockphoto.com

Bruderhand Medien
Am Hofe 2, 29342 Wienhausen, Germany
E-Mail: info@bruderhand.de; Homepage: bruderhand.de

No. 141-35 – Esperanto – 1st edition 2021



# Kiu la mondon plej forte ŝanĝis?

Werner Gitt

141-35 Wer hat die Welt - Esperanto - Aufl 1 2021- V01.indd 1-5
21.05.2021 10:36:27

# Kiu la mondon plej forte ŝanĝis?

**Ĉu vi jam pripensis, kiu persono el la mondhistorio havis la plej fortan influon por la vivo de aliaj personoj?** Ni serĉas tiun, kiu postlasis la plej profundan spuron en la historio de la homaro. Kie ni devus serĉi? Por tiu celo ni unue rigardu super la agado de la homoj sur diversaj kampoj.

Ĉu tio estis la grandaj **esploristoj**? Elstaras inter ili ***Kristofo Kolumbo*** (Christoph Columbus, 1451-1506). Laŭ la mara vojo li intencis navi okcidenten por tiel atingi Hindion. Sed li tiel malkovris novan mondparton, Amerikon! Milionoj da homoj tie trovis sian novan patrujon, per kio ilia vivo forte ŝanĝiĝis.

Aŭ, se ni pensas pri la **inventistoj**. Nia mondo nuntempe estas aparte revolucie ŝanĝita pere de aparta invento – invento de la komputoro. La germana konstruinĝeniero ***Konrad Zuse*** (1910-1995) en la jaro 1938 konstruis la unuan komputoron en la mondo. Tiu invento dume eniris ĉiujn branĉojn de la scienco, administrado, ekonomio kaj persona vivo kaj tiel grandmezure ŝanĝis la mondon.

Ĉu ni tian personon trovos inter la grandaj revoluciuloj? ***Lenin*** (Vladimir Uljanoviĉ, 1870-1924) en la jaro 1917 en Ruslando lanĉis revolucion kaj fondis Sovetunion. Fine de la dua mondmilito tiu regno ampleksis 22,4 milionojn da km$^2$, atinginte tiel la plej grandan ŝtatsurfacon, la seponon de la tera surfaco. En ĉiu urbo de tiu ŝtatego sur publika ejo staris granda monumento de Lenin. Li estis ĉie ĉeestinta »dio de Sovetunio«. La ideo de komunismo havis pretendon konkeri





la tutan mondon. Ek de la tago, kiam lia morta korpo en Januaro 1924 estis metita en la maŭzoleon de Lenin, tie tage kaj nokte post ĉiu horo estis ŝanĝita la gardistaro. Miloj kaj miloj da homoj ĉiutage iris preter la vitra sarkofago. Anstataŭ frekventi preĝejon, la nuptoparoj vizitis tiun maŭzoleon. Sed ek de la merkredo, 6-a de Oktobro 1993, antaŭ la maŭzoleo de Lenin – la celo de la komunisma pilgrimado – ne staris plu deĵorgardistaro. En la komuniko de la agentejo Tass troviĝis lapidara informo: »*La gardpozicio n-ro 1 en la ŝtato estas pro la ŝanĝoj de la protokolo fermita.*« Post Novembro 1993 la maŭzoleo estis fermita.

La ideologio, kiu kondukis al la plej granda mortigado de la homamasoj kaj eĉ speciale de la kristanoj el ĉiuj tempoj, kolapsis. La politiko de la forto, kiu regis en Sovetunio, postlasis pli ol 140 milionojn da viktimoj. La sufero, kian la komunismo portis en la mondon, estas senmezura. Rusa verkisto Fjodor Mihajloviĉ Dostojevski (1821-1881) prave diris: »*Tiuj, kiuj opinias starigi justecon, negante Kriston, fine la mondon dronigos en sangon.*«

Multnombraj **sciencistoj** vizitis tiun ĉi mondon. Reprezentante por ĉiuj aliaj ni nomu nur kelkajn el ili: ***Einstein, Planck, Heisenberg, Newton, Pawlow, Mendelejev***. La doktrinon de evoluciismo prezentis ***Charles Darwin***. Multaj tiun ideon entuziasme alprenis, ja ili opiniis, ke nun oni povas la mondon klarigi ankaŭ sen Dio. Intertempe tiu ideo estis helpe de naturleĝoj koncerne la informon[1] kaj de aliaj larĝaj sciencaj kognoj komplete objetita kaj tiel oni povas paroli pri la trompiĝo de la jarcento.

***Albert Einstein*** (1879-1955) ĝuas nuntempe reputacion de la plej fama sciencisto de la 20-a jarcento. La literaturisto irlanddevena ***Bernard Shaw*** (1856-1950) invitis lin partopreni la premieron de unu el siaj teatrajoj en Londono. Okaze de tio li esprimis tian laŭdparoladon pri Einstein:

> *Napoleono kaj aliaj granduloj fondis mondregnojn. Kaj tamen troviĝas viroj, kiuj kreis eĉ pli grandajn aferojn. Ili ne fondis mondimperiojn, ili kreis mondojn. Apud tio iliaj manoj restas puraj de la homa sango. Ptolomeo kreis la mondbildon, kiu daŭris 1400 jarojn. Newton kreis mondbildon, kiu validis dum 300 jaroj. Einstein tamen kreis mondbildon, sed mi ne scias, kiom longe ĝi havos validon.*

Kaj fine ni volas halti ankoraŭ ĉe la filozofoj. Oni povas renkonti tre grandan nombron de iliaj nomoj, do ĉi tie nur kelkaj elinter ili: ***Sokrato, Platono, Hegel, Feuerbach, Nietzsche***.

***Marx*** estis dirinta: »*Filozofoj la mondon nur diverse interpretis; sed temas pri ĝin ŝanĝi.*« Liaj ideoj estis en la ŝtatoj de la iama orienta bloko levitaj kiel fundamento por la ŝtato, ekonomio kaj socio. Post la kunfalo de la komunismo montriĝis la amplekso de detruado en la ekonomio, sed ankaŭ en la animoj de la homoj.

## Ni eltiru do bilancon

Ĉiuj supre nomitaj personoj ŝanĝis la mondon. Kelkaj tion faris laŭ eĉ tre pozitiva, aliaj laŭ la ekstraordinare negativa maniero. **Sed kiu inter ĉiuj, kiuj iam ajn vizitis tiun ĉi mondon, la mondon tamen plej forte ŝanĝis?** Kiu do ricevas la oran supermedalon, kiun poste postsekvus neniu arĝenta kaj neniu bronza? Sed unue oni devas surlistigi la kriteriojn, laŭ kiuj oni povus juĝi:

- Kiu prizorgis la plej grandan kaj longdaŭran helpon por la homoj?
- Kies eldiroj neniam malaktualiĝis kaj ties instruo estas ankaŭ niatempe plene aktuala?
- Kiu persone sin engaĝis por ĉiu inter ni?



- Kies faro estas efika por ĉiu inter ni?
- Kiu plej profunde movis mian vivon, ke mi nun kiel la aŭtoro skribas la tekston, de vi legatan? Ĉu ***Kolumbo***, ĉu ***Goethe***, ĉu ***Kopernik***?

Okaze de tiel alte metita mezurlato restas nur plu unu persono. Pri li ni volas nun ion aŭdi. La iro de lia vivo ne estas – kiel ni ankoraŭ vidos – evidente io ekstraordinara. Kaj tamen **tiu persono estas la nura**, kiu senpere agas ĝis la mezo de nia vivo. Kiu tiu persono povus esti?

Iu anonima verkisto skizis la vivon de tiu viro tiamaniere:

- Naskita en marĝena vilaĝeto kiel infano de metiista edzino. En iu alia vilaĝo li kreskis kaj laboris en eta laborejo. Tion li faris, ĝis li atingis la aĝon de 30 jaroj. Poste li dum tri jaroj trapaŝis la landon por al la homoj diri, kion li prenas por grava afero.
- Li faris nenion, pro kio oni lin kutime volus ligi kun grandeco kaj rekono.
- Lia aĝo estis nur 33 jaroj, kiam la publika opinio sin starigis kontraŭ li. Tio estas surpriza afero, ĉar li tamen multajn homojn helpis.
- Liaj amikoj de li fuĝis.
- Li estis elmanigita al siaj malamikoj kaj li devis trasuferi monstran proceson kontraŭ si.
- Kondamnita je mortpuno, kvankam neniu povis pruvi ian ajn kulpon de li.
- Inter du rabistoj li estis viva surnajlita al la kruco.
- Kiam li mortis, la ekzekutistoj lotis por lia vestajo, kiu sur la tero estis lia nura posedajo.
- Kiam li mortis, oni metis lin en la luitan tombon. Iu lia amiko disponigis ĝin por li el mizerikordo.
- Kiu estas la viro kun tiel aparta biografio?
- Dume pasis dudek jarcentoj, kaj ĝis niaj tagoj tio estas la centra homo por la homaro kaj la motoro de ties progresado.
- Ĉiuj armeoj, kiuj iam ajn marŝis, kaj ĉiuj ŝiparoj, kiuj iam ajn navis, ne atingis tion, kion li atingis dum siaj tri jaroj.
- Ĉiuj parlamentoj, kiuj iam ajn kunsidis, kaj ĉiuj reĝoj, kiuj iam ajn regis, se prenite entute, ne havis por la vivo de la homoj sur nia planedo tiel fortan influon kiel tiu ĉi unika homo.

## Tio estas Jesuo Kristo

Ni koncentru nin nun ĉe la demando: **Kiu do estas tiu Jesuo?** Pri li estis skribitaj pli ol 60.000 biografioj. Neniu persono el la mondhistorio estis tiom ofte portretita kiel li. ***Napoleono*** esprimis pri li tion ĉi: »*Pri li (= Jesuo) oni parolos eterne, kaj la homoj por li pretos morti.* ***Pri mi (= Napoleono)*** *neniu parolos plu kaj neniu plu pretos por mi morti.*«

### 1. Jesuo estas la Filo de Dio

Okaze de lia bapto el la ĉielo resonis la voĉo: »***Ĉi tiu estas Mia Filo, la amata, en kiu Mi havas plezuron***« (Mateo 3, 17). Se do tiu ĉi voĉo parolas pri »***Mia Filo***«, tiam devas tiu, kiu tiujn ĉi vortojn eldiras, esti lia Patro. Tiu ĉi voĉo venis el la ĉielo – venis de Dio mem! Kaj sur la monto de la metamorfozo Dio diras el la nubo: »***Ĉi tiu estas Mia Filo, la amata, aŭskultu lin***« (Marko 9, 7).

Kiam oni Jesuon enketis antaŭ la sinedrio, la ĉefpastro lin demandis: »***Mi ĵurligas vin per Dio la vivanta, ke vi diru al ni, ĉu vi estas la Kristo, la Filo de Dio***« (Mateo 26, 63). Jesuo tion dum la enketado konfirmis: »***Vi diris***« (Mateo 26, 64).

La krucumadon de Jesuo gvidis romia centuriestro. Tiu aŭdis, kiel Jesuo preĝis por la homamaso, kiu staris en ĉirkaŭo kaj lin primokis kaj ridindigis: »***Patro, pardonu ilin; ĉar ili ne scias, kion ili faras***« (Luko 23, 34). Kaj tiu centuriestro subite ekkonis: »***Vere, ĉi tiu estis Filo de Dio***« (Mateo 27, 54).

[1] W. Gitt with B. Compton and J. Fernandez: ***Information – Der Schlüssel zum Leben***, Kapitel 8 (S. 261-293). PDF-Download: ***wernergitt.de/information***

141-35 Wer hat die Welt - Esperanto - Aufl 1 2021- V01.indd 6-10
21.05.2021 10:36:41